# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si por Hispanio kaj la Homaro

Nº 4-5 1-a JARKOLEKTO JUL - SEP - 84

## II-A ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO



## MALAGA

17 - 19 Aŭgusto 1984

# Gazeto Andaluzia

Fondita en 1910

e JOSE GARZON RUIZ.

)ficiala Organo de AEU

EDITA - ELDONAS

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Inscrita en el Registro de Asociacion
del Ministerio del Interior del Estad
Español con el número 5.475

REDAKTOROJ

José María RODRIGUEZ HERNANDEZ. Kordo
Alberto FRANCO RAMIREZ. Seviljo.
Andrés MARTIN GONZALEZ. Malago.

ENHAVO

:efartikolo................ 1
nformoj...................Z2
ſalaganoj ≠ Mal'ag'anoj.... 5
ſormoj pri la Instruado.... 6
'elevida Oazo.............. 7
'aĝo de la Junularo........ 8
!-a Andaluzia Kongreso..... 9
ınonco..................... 10
EJO-Paĝo.................. 11
ımuzaĵoj.................. 12

ADRESOJ

- Grupo de Esperanto IB SENECA
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

- Centro Cultural GFU (Esperant
C/ Trinidad Grund 28, 2ª
29001 MALAGA

- Asociación Sevillana de E-o
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

- Sevilja Esperanto-Junulara
Organizo. C/ Pozo 3. 41003
SEVILLA

---

a opinioj ĉi tie verkitaj
partenas <u>nur</u> al la subskribantoj"

---

Kunlaboras ĉi-numere krom la redaktoroj:

- Julio HERRERO SEGURA. - Antonio RODRIGUEZ GASCH.
- Lina RUIZ OLIVARES.

Presita ĉe LA KORDOVA ESPERANTISTO

# ĈEFARTIKOLO

## TRI KONGRESOJ

Finiĝis jam la tri Esperanto-Kongresoj kiu okazis ĉi-jare en Andaluzio, la 8-a HEJS-Tendaro, la 44-a Hispana Kongreso kaj la 2-a Andaluzia Kongreso. La rezultoj estis bonaj en la tri kunvenoj.

La gejunuloj de HEJS parolis en Kordovo pri la nuna situacio de sia societo, oni varme diskutis kaj gaje festis, kaj eble oni povas diri ke la estonteco de la hispana junulara organizo metis siajn bazojn en ĉi renkontiĝo kiu klarigis kio estas HEJS kaj kiel povos ĝi ekzisti kaj daŭrigi sian aktivadon.

La hispanaj geesperantistoj renkontiĝis dum Julio en Seviljo, eble ĉiuj memoros ĉi kongreson pro du aferoj. Unue pro la varmego kaj due pro la ŝtelistoj. La LKK laboregis por organizi partoprenindan kongreson. Ĝi sukcesis kaj estis pruvo de la bona laboro kiun tage plenumas la sevilja esperantistaro. En la kongreso oni aŭdis certajn vortojn: "oni ne povas nomiĝi esperantiston tiu persono kiu ne ĉeestas la nacian kongreson nur pro la varmego". La seviljanoj laboris por la inda sukceso de la Kongreso, kiu ja okazis tiel, tamen oni vidis grandan diferencon inter la kvanto da personoj aliĝitaj kaj tiuj kiuj efektive ĉeestis Seviljon. Ciumaniere la Sevilja Kongreso prezentis novajn ideojn por la efektiva plenumado de la kongresaj temoj, tiel ekmarŝiĝis la artaj, sciencaj kaj kulturaj horoj, jen bona ideo de kleraj samideanoj kiuj prelegis kaj babiladis pri kelkaj aktualaj temoj kaj kiuj atingis grandan sukceson en la Kongreso. Ĉi tiuj interesaj prelegoj oni ripetos en venontaj kongresoj sub la gvidado de s-ano Antonio Alonso.

Kaj la lasta Kongreso estis tiu kiu okazis en Aŭgusto en la mediteranea urbo Malago. Okazis jam la dua Esperantista Kongreso de Andaluzio. Dum ĝi oni oficiale parolis kaj prezentis la Andaluzian Esperanto-Unuiĝon, ĉi asocio ekde nun gvidos la E-movadon en nia regiono. La laboro de la malagaj esperantistoj estis sukcesa kaj ili atingis kunvenigi pli ol 50 gesamideanoj de la tuta Andaluzio. Do, ĉi jaro, kiu povos nomiĝi jaro de la andaluzia E-movado ja sukcesis, ĉar ĝi facile plenumis sian unuan celon, t.e.

diskonigi la internacian lingvon ESPERANTO-n al la tuta ANDALUZIO.

Dum la venonta jaro okazos en Andaluzio du kongresoj: la 9-a HEJS-Tendaro okazonta dum Aprilo en Malago kaj la 3-a Andaluzi Kongreso dum Aŭguste en Seviljo, same la kordovanoj intencos organiz semajno pri Esperanto. Ni, kaj ĉiuj, esperas ke la jaro 1985 estos pli aŭ same sukcesa ol 1984.

LA REDAKCIO

# INFORMOJ

## MALAGO

- De la 4-a de Septembro ĝis la 14-a de Decembro, en nia sidejo, 15 gelernantoj lernis la elementan kurson de Esperanto, kiun gvidis samideanoj Rafaelo kaj Julio.
- En la monato Septembro vizitis nin esperantisto, denaska andaluzo, sed de multaj jaroj loĝanta en Francio. Li estas SAT-ano kaj dum unu semajno ni havis la plezuron paroli kaj praktiki la lingvon kun li.
- Ekde la 3-a de Novembro, ĉiun sabaton matene, kunvenas en la sidejo de la Vegetara Rondo, s-ano Andreo kun kelkaj societanoj kaj simpa tiantoj kiuj lernas la elementan kurson de Esperanto. Ili abonis la revuon "Vegetara Esperantisto".
- La 20-an de Oktobro, s-ano Andreo Martín prelegis en la sidejo de "Sindikato de Hispanaj Verkistoj" pri la temo "Aportaniones literarias de los Esperantistas Españoles". La tekston de la prelego (hispanlingve) ni povas havigi al tiuj kiuj ĝin petos.
- Por la komenco de la jaro 1985a ni planis la instruadon de E-o en la Fakultato pri Filologio kaj en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj.
- Ĉiuvendrede, je la 8-a nokte, kunvenas la progresintoj por parole praktiki la lingvon.
- TRE GRAVA !!!! De la 24-a ĝis la 28-a de Novembro okazis en la Hotelo "Aloha Puerto Sol" Torremolinos (Malago) la 1-a Kunvencio de Eŭroplingvaj Verkistoj. Nu, la 4 oficialaj lingvoj estis la hispana, franca angla kaj ... ESPERANTO. Jes, ĉiuj raportoj estis

tradukitaj al Esperanto kaj s-ano Andreo Mart*in, nome de HEF prel
gis sian raporton en la Internacia Lingvo. Dum tiuj tagoj, la sta
dardo kun kvinpinta verda stelo ĉe la enierjo de la Hotelo repreze
Esperantujon. La 2-a Konvencio okazos en Cipro kaj ni klopodis po
Esperanto estu denove oficiala laborlingvo.

J.H.S.

## KORDOVO

- La pasintan 1-an de Septembro vizitis nin grupo da geamikoj, af
blaj kaj gajaj malaganoj, kiuj restis kun ni dum du tagoj, ĉi v
zito suldiĝis al la bona amikeco kiu naskiĝis inter membroj de
baŭ grupoj. Dum ĉi tiu Unua Tago de la Amikeco Malago-Kordovo
manĝis komune, promenadis tra Kordovo, naĝis en publika naĝejo
eĉ ni estis ĝis lastaj horoj de la nokto en kordova ĝardeno rak
tante spritaĵojn kaj anekdotojn. Ĉi cio pruvas la bonan amikec
kiu ekzistas inter la E-grupoj de ambaŭ urboj.

- Grupo da 5 gesamideanoj partoprenis en la 2-a Andaluzia Kongres
de E-o kiu okazis en Malago, tiuj kiuj iris rakontis post sia a
veno nur mirindaĵoj pri la Kunveno, kaj tio provokis la envion
tiuj kiuj ne povis ĉeesti la neforgeseblan Kongreson.

- La propagando farita en Kordovo pri la Andaluzia Kongreso estis
da. Dum du tagoj gemembroj de nia grupo parolis en Radiocadena
pañola, kaj oni sendis artikolon al la ĵurnalo CORDOBA pri la K
greso. Kun granda surprizo aperis malgranda informo en DIARIO
ANDALUCIA pri la kordova partopreno en la Malaga Kongreso.

## ŜEVILJO

- Kiel vi jam eble scias la 44-a Hispana Kongreso de E-o aranĝita
Seviljo, lasis preskaŭ 100.000 pesetan profiton al HEF. Ankaŭ SE
atingis ioman profitan monon , per kiu oni faris kelkajn aranĝo
fizikajn en nia sidejo de strato Sol.

- La pasintan Oktobron, kunvenis en la centro de SEJO grupo da per
noj, kiuj respondecos pri la organizado de la 3-a Andaluzia Kong
so en Seviljo. Oni proponis kongresprogramon kaj parolis pri div
saj detalaj kongresaj. Ĝis nun ok personoj respondecis pri tiur
kongresaferoj.

- La pasintan 1-an de Novembro oni komencis kurson de Esperanto je baza kaj meza nivelo en la gimnazio VELAZQUEZ (Ĵusa Kongresejo). Ĝis nun aliĝis 15 gelernantoj, kaj ni ne scias ĉu tiu numero pliiĝos aŭ malpliiĝos. La kurson oni gvidas pri la metodo ESPERANTO I de Czerdahely.

- SEJO aranĝis ĉi-vintre du konferenciojn en publikaj centroj de Seviljo sub la nomo "Esperanto, lingvo de prezenco". La unua okazis la lastan vendredon de novembro en la librejo "Osiris"., la dua en la centro "Duna", kie oni klopodas aranĝi Esperanto-Kurson.

- SEJO aranĝis serion de semajnaj konferencoj su la titolo "Vintraj Parolrondoj". En ĉiu el ili, membro de nia asocio parolas pri iu temo de li pli-malpli regata, kaj tion sekvas debato. Ci tiaj aktivaĵoj estas tre fruktodonaj kaj por levi nian lingan nivelon kaj por ekkoni novajn temojn. Ĝis nun okazis jenaj prelegoj: Francisco Pérez Cruces parolis pri "Historiaj anekdotoj pri Seviljo". Alberto Franco parolis pri la temo "Iom pir la Kamito-Semida lingvaro". Antonio Rodríguez pri "Iom pri la vetero science". Kaj Luis Gilpérez pri "Aventuro tra Rivero". Pri la venontaj parolrondoj ni informos baldaŭe.

- Eble la plej surpriza novaĵo koncerne al SEJO estas la malapero de ĝia antikva revuo. Tamen, sub la kunordigo de la nova zorganto pri kulturaj aktivaĵoj de SEJO, Francisco Pérez Cruces, aperos nova revuo sed fanzino. Se vi volas scii pliajn informojn pri la revuo aŭ pri abono adresu al ni.

## LA LINEA DE LA CONCEPCION

- La 4-an de oktobro, organizite de la bahai-a komunumo, okazis en la Kulturdomo prelego kaj ekspozicio pri la Internacia Lingvo Esperanto. La loka ĵurnalo AREA informis, eĉ kun foto, pri la evento kaj same faris la radiostacio RADIO ALGECIRAS. Pro la menciita aranĝo kaj informoj, multaj gejunuloj interesiĝis pri la lernado de la lingvo.

(El BOLETIN)

## M A L A G A N O J ≠ M A L ˙ A G ´ A N O J

Ja la titolo ne mensogas la esperantistaro de la urbo Malago, t.e. la MALAGANOJ, certe ne estas personoj kiuj ne emas labori kaj agi por la internacia lingvo, t.e. la MAL´AG´ANOJ. Multaj personoj en Hispanio miras la rapidan evoluon de la andaluzia E-Movado, kiu supozis la kreon de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, de Andaluzia Esperanto-Junularo kaj de ĉi tiu revuo. Ĉi ĉio suldiĝas al multaj faktoj sed precipe al la laboro de la grupo de Esperanto de Malago.

La malaganoj akceptis la respondecon por regi la AEU-n, kune kun alia eksterlandaj samideanoj. Tamen aliaj faktoj devas esti konendaj kaj disvastigataj al la tutandaluzia esperantistaro. Eble vi ne scias tion, sed la pasinta 15-a de Decembro kelkaj radiostacioj de tiu urbo elsendis kantojn en la internacioa lingvo, eble ĉi tio okazis nur en Malago, sed ĝi estas sekvinda ekzemplo por ĉiuj hispanaj grupoj por la venontaj jaroj.

Ankaŭ la plej grava triumfo de la Hispana Esperanto-Movado dum 1984 okazis en Malago. En la monato Novembro la malaganoj atingis ke la lingvo ESPERANTO, tiu lingvo kiu kutime estis konsiderata de multaj verkistoj kiel artefaraĵo, sensencaĵo aŭ aliaj aĉaj aĵoj, nu tiu lingvo estis konsiderata kiel oficiala lingvo, same ol la angla, franca kaj hispana, de la Kunveno de Eŭroplingvaj Verkistoj kunvenitaj en Malago.

Tamen ne kredu ke ĉi atingo estis facile; niaj malagaj samideanoj arde laboris, tradukis ĉiujn prelegojn en la internacian lingvon kaj eĉ prezentis laboron pri Esperanto.

Se mi daŭrigus ĉi tiun rakonton pri la esperantistaro de Malago eble oni neniam finiĝus. Tage la malaganoj prizorgas pri AEU, tamen samtempe ili instruas Esperanton en diversaj lokoj, kaj eĉ per korespondo, eldonas kutime kaj regule sian revuon, akceptas varme naciajn kaj eksterlandajn geesperantistajn kaj nuntempe, krome, ili preparas la 9-an HEJS-Tendaro.

Kun ĉi artikolo mi neniel deziris fari laŭdparoladon, neniu nomo estas skribata ĉar ĉiuj konas ilin. Oni deziras fari, pere de ĉi modesta raporteto rektan skribon pri tiuj personoj, kiuj oferante sian liberan tempon kaj eĉ privata familia vivo, estas vera fiereco por tiuj personoj kiuj nomiĝas esperantistoj; ili, krome, povas nomiĝi MALAGANOJ !

Muhammad ibn abu-al Amir

NORMOJ PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO KONTROLITA DE ILEI-HEF

(Senditaj de Hispana Sekciestro de ILEI al Prezidantino de HEF por ke ŝi akceptu ilin se tio konvenas al la Nacia Organizo)

1) En la estonto, la instruado de Esperanto funkcios en Hispanio, oficiale, laŭ la programoj aperintaj, siatempe, en Boletín de la Federación Española de Esperanto.

2) Oni estigas la instruadon de Esperanto je elementa, meza kaj supera niveloj.

3) La Supera Esperanto-Lernejo komencos funkcii dum la lernojaro 86-87.

4) Ĉiuj grupoj aŭ organizoj dezirontaj validigi la diplomojn pri lernado de Esperanto atingitajn de siaj lernantoj akceptos nepre ĉi normojn.

5) ILEI kaj HEF, kune kun la Grupo aŭ Organizo instruinta la Lingvon donos la koncernajn diplomojn al ĉiuj kiuj trapasis sukcese la rilatan ekzamenon.

6) La ekzameno konsistos el du partoj, t.e. teoria (pri konoj) kaj praktika (parolado). Por atingi la diplomon nepras sukcesi duflanke.

7) Oni donos la respondajn atestilojn al tiuj kiuj trapasis unuflanke la ekzamenon.

8) Kiam iu deziros konsulti pri Gramatiko, Historio de la Movado aŭ Historio de Esperanta Literaturo rajtos direkti sin al responda profesoro el la teamo estigita ĉi-cele je nacia nivelo.

9) Ĉiu grupo aŭ organizo deziranta atingi la diplomon por siaj lernantoj devos turni sin al ILEI (Str. Trinidad Grund 28 2ª MALAGA 29001).

10) ILEI liveros neripetitajn listojn da ekzercoj al Grupoj aŭ Organizoj petintaj ilin, ne validos aliaj ol tiuj havigitaj de ILEI por ĉiu kazo.

11) Post la efektivigo de la teoria parto de la ekzameno, la respondeculo sendos al ILEI la koncernajn protokolojn. Se la lernanto sukcesis, ILEI sendos al li la rilatjn diplomojn aŭ atestilojn.

12) Ne validos aliajn diplomoj, je ĉia nivelo, ol tiuj kiuj havas la stampon de HEF aŭ/kaj ILEI.

| | |
|---|---|
| 8 | RAI UNO |
| 20 | RAI UNO |
| 21 | CANALE 21/TELE MONTE CARLO |
| 22 | CANALE CINQUE |
| 23 | TELE TUSCOLO |
| 24 | ITALIA 1 |
| 25 | TELE RADIO SOLE |
| 26 | CANALE CINQUE |
| 27 | TELE ROMANA |
| 28 | RAI DUE |
| 29 | TELE ROMA EUROPA |
| 30 | RETE QUATTRO |
| 31 | RETE TELEVISIVA LAZIALE RTL |
| 32 | RETE QUATTRO |
| 33 | G. B. R. |
| 34 | TELE TEVERE |
| 35 | RAI DUE |
| 36 | - - - - |
| 37 | - - - - |
| 38 | TELE STUDIO |
| 39 | RAI TRE |
| 40 | T.V.A. 40 |
| 41 | TELE ITALIA |
| 42 | TELE ROMA EUROPA |
| 43 | RAI TRE |
| 44 | RETE A |
| 45 | TELE REGIONE |
| 46 | SPQR 46/RETE CAPRI |
| 47 | G. B. R. |
| 48 | ELEFANTE TV |
| 49 | ITALIA 1 |
| 50 | TVR VOXSON/EURO TV |
| 51 | ANTENNE 2 (francese) |
| 52 | CANALE CINQUE |
| 53 | TV6 CANALE 53 |
| 54 | G. B. R. |
| 55 | RETE QUATTRO |
| 56 | TELE ROMA 56 |
| 57 | TELE TEVERE |
| 58 | ELEFANTE TV |
| 59 | VIDEO UNO |
| 60 | TVR VOXSON/EURO TV |
| 61 | TELE STUDIO |
| 62 | TELE ROMANA |
| 63 | ITALIA 1 |
| 64 | ITALIA 1 |
| 65 | - - - - |
| 66 | CANALE 66/TELEROMA 56 |

## TELEVIDA OAZO

(Pri raporto de romana esperantisto)

Ĉu imageblas urbo, kie la nombro da televidaj retoj superas al tiu da radi elsendejoj en via urbo?

Tion mi povis konstati, kiam mi est en la itala ĉefurbo. Tiea samideano, mata de mi poŝraportis pri tio kaj tra kribas laŭtekste jenon:

Jen tiuj 26 televidstacioj videblaj ĉ Romo:

"120 estas la nombro de radio-stacioj vataj en FM en la "Lazio-regiono" (la provinco de Romo plus 4 aliaj provinc La televidoj, videblaj en Romo estas praktike "nur" 26 diversaj, el kiuj ŝtataj stacioj "RAI 1, 2 kaj 3". 6 pr vataj retoj tutnaciaj (CANALE 5, ITA RETE 4, ELEFANTE TV kaj EURO TV), 1 levida stacio, kiu, per ripetiloj, al nas el Parizo (ANTENNE DU). 116 loka stacioj. Unu sendo-stacio utiligas sa tempe du aŭ tri frekvencojn. Tiu ĉi f nomeno de la multaj televiziaj retoj, estas unika en la mondo: kompare laŭ statistikoj, unu kvadrata kilometro é Romo havas pli da stacioj ol Novjorko aŭ alia urbego".

Alie, ĉiun kvaron-horon la privata retoj elsendas du minutojn da reklamo. Ta men RAI ne intertempan reklamon. Rimarki de estas, ke el tiuj 26 kanaloj preskaŭ komenciĝas en la mateno kaj komenciĝinte eĉ je la oka matene ne finiĝas ĝis eĉ pos noktmeze.

Antonio Rodríguez Gasch.

# PAĜO DE LA JUNULARO.

Kvankam ĉi artikolo aperos en revuo sub la dato Julio-Septembro oni devas informi ke ekde la 30-an de Decembro jam ekzistas la ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO. Niaj statutoj estis aprobataj de la estraro de HEJS kaj de tiu de AEU.

La plej bazaj punktoj de la statutoj de la AEJ estas:

- siaj celoj: kunordigi la laborojn de la gejunuloj ene de AEU. kunordigi la laborojn de la andaluzoj ene de HEJS. diskonigi la lingvon Esperanto-n al la andaluziaj gejunuloj.

- sia agadkampo: Andaluzio, tiel kiel oni difinas ĝin en sia aŭtonomia-statuto, kune kun la urboj Ceŭto kaj Meliljo.

- sia estraro: formata de Prezidanto, vicprezidanto. ĝenerala sekretario kaj 3 vokaloj.

- Povos esti membroj de AEU: ĉiuj membroj de AEU malpli ol 26jaraj tamen ili devos peti ĝin, tiel sia enirado en AEJ ne estos aŭtomata, ĉiumaniere ne estos kroma kotizo por ili.

  Ĉiuj gejunuloj malpli ol 26jaraj kiuj ne apartenas al AEU, ili ja devos pagi kotizon.

Jen la plej gravaj punktoj, ĉiumaniere se vi deziras legi la statutojn (hispanlingve) por pripensi vian aliĝon al AEJm petu ilin tute senpage al la jena adreso.

- ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO
  Poŝtkesto 611
  14080 CORDOBA

AEJ

## 2-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Kelkaj monatoj post la dua Andaluzia Kongreso de Esperanto, la ideon kiun mi memoras kaj kiu samtempe estis nuna dum la kongreso estis la frateco kaj tio temas pri la plej ampleksa senco de ĉi granda vorta.

Estis 5 la samideanoj de Kordovo kiu partoprenis en ĉi Kongreso en la bela kaj gaja urbo Malago, Kaj se io ne konis ĝin sufiĉe bone ni pasis bonajn momentojn dum la promenadoj, kiuj krom belaj ili iĝis plie dank'al afableco kiu regis dum la kongreso. La komunaj manĝadoj inter ĉiuj kongresanoj, helpis precipe krei etoson kaj eĉ la interparolado en la koridoroj.

Mâlaganoj, kadizanoj, jaenanoj, jerezanoj, seviljanoj madridanoj kaj kordovanoj kunloĝis dun tiuj intensaj tagoj (pri la aktoj vidu la paĝon pri tiu temo). Estas dankenda la ĉarma akcept do de la malaganoj kiuj dum la tuta kongreso helpis nin, ekde nia alveno al la Malaga Stacidomo, gastigado, ktp ĝis nia adiaŭo en la Stacidomo denove. Oni devas noti la novajn kontaktojn de amikeco kiuj naskiĝis pro ĉi tiu dua Andaluzia Kongreso: en la menso de ĉi kongresanoj estis ideo pri nova ne-formala renkontiĝo kiu povus pl fortigi niajn amikecajn rilatojn kun ĉiuj samideanoj de nia region

Ni devas gratuli, denove, ĉiujn malaganojn kiuj kun ilia ampulso kaj pro ilia vizito al Kordovo dun la 31-a - 1-a de Septembro. Ni jam esperas, post detrui la glacian muron, daŭrigi niajn kontaktoj kiuj povos esti tre pozitivaj por la disvastigo de nia lingvo, eĉ por plifortigi la intereso inter la plej aktualaj esperantanoj.

Jam en Malago oni propagandis inter siempatiantoj de l

lingvo kiuj nuntempe estas gelernantoj de la GFU (Esperanto-Fako).

Se ni bilancas ni devas agnoski ke la 2-a Andaluzia Kongreso de Esperanto estis tre pozitiva, por disvastigi la organizadon de Esperanto je regiona nivelo kaj por unuigi kulture kaj kore ĝiaj parolantoj.

Certe la adiaŭo estis tre malfeliĉa, sed ĉio jam estas bona memoro kaj deziroj por revidi ĉiujn en novaj kongresoj.

Estu Tiel !

Lina RUIZ OLIVARES

---

ANONCO

KIAM VI IROS AL MALAGO (HISPANIO) NE FORGESU ĈI ADRESON:

"HOSTAL RESIDENCIA LA HISPANIDAD" EXPLANADA DE LA ESTACION, BLOQUE 5

TELEFONO 952-311135 MALAGA.

TEMAS PRI GASTEJO KOMFORTA, KUN MALALTAJ PREZOJ KAJ KUN MASTRO PAROLANTA ESPERANTON, PLIE ĜI SITUAS APUD TRAJNA STACIDOMO;

---

# S.E.J.O – PAĜO

La pasintan Oktobron, en ĝenerala Kunsido de SEJO oni renovigis la estraron, ankaŭ oni kreis zorganton pri kulturaj akti ĵoj, kiu ankaŭ vicprezidantos. La nova estraro do, restis jene:

- Prezidanto: Juan de Dios MONTOTO SARRIA
- Vicprezidanto: Francisco PEREZ CRUCES
- Sekretario: Alberto FRANCO RAMIREZ
- Kasisto: Antonio RODRIGUEZ GASCH
- Voĉdonantoj: Eduardo GONZALEZ ORDOÑEZ
  Dolores GARCIA PEREA
  Virginia MARQUEZ MARTIN

En tiu kunveno oni aprobis ankaŭ la aliĝon de SEJO al reto de lokaj grupoj de UEA, kaj eblan aliĝon al KONTAKTO, ESPERAN aŭ MONATO.

Fine oni aprobis la elspezon de la cetero el la subven de la Urbodomo enspezita somere.

- Unue oni diskonigis al la membraro la aĉeton de tenis-tablo
- Oni aprobis monhelpon al Sevilja Esperanto-Asocio po 33.000 pto
- Elspezo de 10.000 ptoj por aranĝoj en niaj klubejoj.
- Elspezo de 2.500 ptoj por faro de membrokartoj.
- Elspezo de 2.000 ptoj por plibonigi la revuon.

En la Banko restas ankoraŭ mono, pri kiu la Ĝenerala Ku sido disponos venonte.

Fine ni devas informi ke antaŭ nelonge eniris ŝtelistoj en nian sidejon sur strato Pozo kaj ŝtelis al ni kelkajn el niaj pr praĵoj, inter ili, la kasedaparaton ĵus aĉetitan.

SEVILJA ESPERANTO-JUNULARA ORGANIZO

# AMUZAĴOJ

## ENIGMO

Petro, ĉiam tre akurata, revenas ĉe li kaj rigardas ke sia ununura horloĝo haltiĝis. Kiel li ne posedas alian horloĝon, eĉ ne brakhorloĝon, li decidas iri ĉe sia amiko Ludoviko por koni la certan horon.

Tiom li faras kaj dum la vizito li estas ĉe Ludoviko dum 1 horo, post scii la akuratan horon li revenas siam propran domon. Tiel kiam li alvenas ĉe li, li mem ekmarŝigas la horloĝon en la certa horo, malgraŭ li ne sciis la tempon kiun li uzis por reveni ĉe li. Same li sciis nek la tempon nek la distancon inter sia domo kaj tiu de Ludoviko. Ĉiumaniere sia horloĝo havis la akuratan horon. Kiel li povis koni ĝin?

La solvo aperos en la numero 1/85.

- ATENTU ! La solvantoj atingos belajn esperantaĵojn kaj kordovaĵojn.

- Solvis la enigmon de la numero 3-a nia amikino : InmaculADA Illanes Ortega.

---

Fino de la numero 4-5 / 84. Eldonkvanto: 150 ekzemplaroj.

GAZETO ANDALUZIA oficiala organo de ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO.

I M P R E S O S

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO
A. E. U.
CORDOBA
ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

"GAZETO ANDALUZIA"

Dissenda Centro
C/ Sol 75

S E V I L L A - 3